



Bulteno


de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2024 (232)

13. 12. 2024

Denove surspure de doktoro Zamenhof



Kompilaĵo de bildoj: Pavla Dvořáková

La 7-an de novembro Pavla Dvořáková invitis nin por daŭrigo de la esplorvojaĝo tra la tempo al la lokoj ligitaj kun la vivo de doktoro Zamenhof (serio „Surspure de doktoro Zamenhof“). Ĉi-foje ni ekskursis al du ĉarmaj konataj banlokoj situantaj en sudo de Pollando – Duszniki-Zdrój kaj Szczawno-Zdrój –, kie Zamenhof feriiis kaj kuracis sin antaŭ aŭ post la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Post la prelego sekvis kuna kantado de Esperantaj kantoj kun ukuleloj.

EL LA ENHAVO

Historio de la E-fako de KAVA-PECH	3
Thatcher kaj ŝia sinteno al klimatsanĝo	6
Premioj por esprimlibereco	9
Rakontoj kaj eseoj	10
100 jaroj ekde la naskiĝo de Škvorecký	17
Štefanik en Afriko	19
La Infano Jesuo de Prago	22

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

Okazintaĵoj ekde novembro

07/11/2024 – prelego de Tomáš Břicháček pri lokoj ligitaj kun la komencoj de Esperanto en Prago (*kunvenejo*)

21/11/2024 – prelego de Pavla Dvořáková „Surspure de doktoro Zamenhof – en la polaj banlokoj“; poste kuna kantado kun ukuleloj (*kunvenejo*)

05/12/2024 – prelego de Josef Kalčík pri tio, kiel la Ĉeĥa Esperanto-Asocio propagadas Esperanton (*kunvenejo*)

12/12/2024 – Zamenhoftago – tradicia kunveno ĉe Esperanto-monumento en Vyšehrad kun tosto, torto, kantado kaj amikeca babilado



10-a Granda lokŝumado en Bratislavo

Prosíme, nezapomeňte zaplatit klubové členské příspěvky na rok 2025. Výše ročního příspěvku činí 200 Kč; pro studenty a seniory 100 Kč. Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo bankovním převodem na bankovní účet č. 2801096435/2010. Při bankovním převodu uveďte raději svoje jméno. Kontakt: Jiří Mišurec, misuj@email.cz.

Historio de la Esperanto-fako de la eldonejo KAVA-PECH

Petr Chrdle

Kiel videblas de la kompleta nomo de la mallongigo KAVA-PECH *Kongresová A Vzdělávací Agentura PEtra CHrdleho*, ĝia celo origine ne estis eldonado de libroj. La agentejon mi fondis en la jaro 1991, sed jam en la jaro 1992 mi eldonis la unuan libron. Ne pro emo fariĝi eldonisto, sed pro neceso mem eldonadi la prelegkolektojn el de mi organizitaj fakaj eventoj. Ili estis plejparte en la ĉeĥa kaj germana, nur pli poste, kiam mi sentis min ekonomie sufiĉe forta por riski malprofiton, mi komencis agadi ankaŭ por esperantistoj. La unuaj Esperanto-aranĝoj estis la kolokvo por Akademio de Esperanto kun eldonita prelegkolekto *La stato kaj estonteco de Esperanto* kaj la kongreso de SAT en Strážnice kun ĝia antaŭkongreso en Prago paralele kun la AdE-kolokvo.

Sed la eldonado de libroj fariĝis hobbio por ni (mi kaj mia edzino Stanjo¹), do ni komencis eldonadi ankaŭ aliajn librojn, ne nur prelegkolektojn, inkluzive de tiuj en Esperanto. Ĝis la jaro 2024 KAVA-PECH eldonis 262 librojn, el ili 108 en Esperanto. Do tiuj 108 libroj kreas la Esperanto-fakon de la eldonejo. Klare, ne ĉiuj estas ankoraŭ surstoke.

En produktado de ĉeĥaj kaj Esperantaj libroj ne estas granda diferenco. Male estas tre granda diferenco en iliaj distribuoj. Por la ĉeĥaj mi havas ekskludan distribuanton KOSMAS, do tio postulas de mi preskaŭ neniun administran pezon. Ĉiumonate laŭ la anonco pri nombro de venditaj libroj mi sendas al Kosmas fakturon, librotenado estas simpla, same kiel la impostdeklaroj (kvarfoje jare pri AVI² kaj unufoje jare pri gajno/malgajno).

Tute alia estas burokrataĵoj kunigitaj kun la distribuo de la libroj en Esperanto, plejparte eksterlanden. Eĉ se en ridinde malgrandaj volumoj, ĝi devas plenumi ĉiujn trajtojn de la internacia komerco: apartan evidencon de la vendoj ekster Ĉeĥion, kaj al EU-landoj, se la partnero estas ankaŭ AVI-paganto (ekzemple UEA, germana libroservo, ...) kaj ĉiumonate deklari evidencan devon (záznamní povinnost); kaj al eksterEU-landoj, kiuj devas esti dogane pritraktataj kaj aparte signitaj en la impostdeklaro, plenumo de jure devigaj statistikaĵoj (sub altaj punminacoj), ktp. Krome,



¹ Stanjo = Stanislava Chrdlová (1954–2000) estis ne nur mia edzino, sed ankaŭ la plej proksima kunlaborantino ene de KAVA-PECH kaj kunaŭtorino de la lernolibro *Esperantem za tři měsíce*, ekde la kvara eldono plilarĝigita al *Esperanto od A do Z*.

² AVI = Aldonvalora imposto (daň z přidané hodnoty)

ĉiu korespondado kun la klientoj okazas en Esperanto. Kiun dronoplenan vojon mi devis trairi, antaŭ ol la financofico komencis akcepti la dokumentojn en Esperanto, mi priskribis en la verko *Mia vivo kun Esperanto*, ĉeĥa versio *Život s esperantem*.

Tion ĉion mi havis en mia cerbo, kiam mi batalis kontraŭ morto dum du sinsekvaj danĝeraj malsanoj post kovimo kaj ĉe la notario, kiam mi faris testamenton. Mia plej aĝa filino, kiu heredos mian firmaon, certe ĝin likvidos, sed antaŭ tio ŝi devos plenumi ĉiujn restantajn kontraktojn kaj devontigojn. Tio certe ne estos problemo rilate al la ĉeĥaj libroj, sed terure komplika por ŝi, nekonanto de komercaj leĝoj, rilate al la Esperantaj, des pli, ĉar ŝi ne scipovas Esperanton.

Tial mi decidis laŭeble baldaŭ liberiĝi de la Esperanto-fako, tamen ne volis likvidi la restantajn librojn en Esperanto. Mi do strebis trovi iun, kiu transprenus ilin, sed ne trovis. Sed ekbrilis eĉ pli bona solvo: François Bolduc el kanada Montrealo, kiu ĝuste en tiu tempo planis fondi eldonejon por eldonadi Esperanto-librojn, ofertis al mi, ke li transprenos mian eldonejon kaj daŭrigos ĝian agadon. Ni faris kontrakton kaj lasis ĝin kontroli ĉe juristoj, por ke ĝi kontraŭu nek la ĉeĥan, nek la kanadan juron. Rilate tion mi volas publike danki al Tomáš Břicháček, kiu dume estis mia jura konsilanto. Kaj tiel okazis. Li ankaŭ aĉetis kontraŭ forte rabatitaj prezoj profunde sub la produktokostoj (klare, ĉar plejparton li ne sukcesos disvendi) la reston de la stoko de la libroj en Esperanto. Parton mi sendis al li en Montrealon, parton transprenis persone lia kunlaborantino el Budapeŝto Stela Besenyei-Merger.



Sed mi volis, ke ankaŭ ĉeĥaj esperantistoj havu eblon plu aĉetadi la librojn eldonitajn en Ĉeĥio. Do antaŭ vendo de la restantaj libroj al François mi interkonsentis kun ĈEA, ke ankaŭ ĝi ricevu rabatite sufiĉan kvanton da libroj, kiujn ĝi distribuos pere de la libroservo en Esperanto-muzeo. Ilin eblas jam nun aĉeti persone en Svitavy aŭ mendi pere de Marie Ĉumová, Marie.Cumova@seznam.cz.

Provizore, ĝis la nova eldonejo *Les éditions KAVA-PECH* havos propran retejon, la mendojn de eksterlande plu kolektos mia retejo <https://kava-pech.cz/esperanto> kaj mi plusendos ilin al Montrealo kaj Budepeŝto. Sed ĉeĥajn esperantistojn mi petas mendadi la librojn en Esperanto rekte ĉe ĈEA.

Fine mi volas ĝustigi iujn malverajn famojn pri mi, kiuj venis al miaj oreloj:

1e, mi **ne** kabeiĝas³, male mi nun havos pro malpli da burokrataĵoj espereble pli da tempo por esperantumi: vizitadi la Esperanto-aranĝojn, verki, ...

2e, KAVA-PECH **ne** bankrotis kaj ĝi plu ekzistos, nur ne plu agos internacie pro pli supre menciitaj kialoj,

3e, mi **ne** estas mortanta (almenaŭ mi kredas!) kaj danke al Dio kaj al miaj kuracistoj mi jam denove fartas relative bone. Jes, mi devas glutadi amason da medikamentoj kaj regule subiĝi al diversaj sankontroloj, sed sciante, ke kun malnova aŭto oni devas ofte vizitadi aŭtoriparejon, mi komprenas, ke kun maljuna korpo mi devas vizitadi simile la korporiparejojn. Sed tamen mi povas plu ĝui la vivon kaj Esperanton, eĉ se kun iuj limigoj.

České resumé pro začátečníky: Esperantská část mého nakladatelství KAVA-PECH končí svoji činnost, s níž bude pokračovat nově založené kanadské nakladatelství *Les éditions KAVA-PECH*. Čeští esperantisté však mají nadále možnost objednávat dosud vydané esperantské knihy u Českého esperantského svazu: buď osobně v muzeu esperanta ve Svitavách, nebo objednat na adrese Marie.Cumova@seznam.cz.

³ Kabeiĝi: subite de fervora esperantisteco komplete forlasi Esperanton. Laŭ fama fervora Esperanto-verkisto, tradukanto, AdE-vicprezidanto kaj movadano KABE (Kazimierz Bein, 1872–1959, kiu en la jaro 1911 subite sen ajna klarigo komplete malaperis el la movado).

Thatcher kaj ŝia sinteno al klimatsanĝo

Vojtěch Pecka



En la 8-a de aprilo 2013 mortis Margaret Thatcher. Ŝi estis politikistino, kiu kiel la unua el mondgvinduloj avertis antaŭ la danĝero de globala varmiĝo. Jam en jaro 1990 ŝi postulis sindevontigan malaltiĝadon de emisioj. Klimatprotekto estis por ŝi konservativa valoro.

„Globala klimatsanĝo estas io, kio influos ĉiujn. Kaj la mezuroj efikos nur tiam, se ni enkondukos ilin internacinivele,“ ŝi deklaris en UN en 1989. „Grandajn partojn de

nia planedo povas infesti sekeco kaj malsato, se sekve de la detruo de arbaroj kaj akumulado de forcejaj gasoj ŝanĝiĝos cikloj de pluvoj kaj musonoj. ... Kaj en solvo de ĉi tiuj problemoj ni sukcesos nur tiam, se ni turniĝas al larĝa internacia kunlaborado.“

Margaret Thatcher estis la unua brita ĉefministrino kun scienca titolo. Kaj laŭ memoroj de klimatsciencistoj danke al tio ŝi havis ege bonan komprenon de la problemaro. Ŝi estis unu el la unuaj mondaj politikistinoj, kiuj serioze traktis problemaron de globala varmiĝo, sed ankaŭ aliaj mediaj problemoj. Ŝi avertis ne nur pri la risko de globala varmiĝo, ozona truo, sed ankaŭ acidaj pluvoj, poluado de grundo aŭ endanĝerigo de oceanoj. En siaj paroloj ŝi konstatis tion, ke zorgo pri vivmedio estas unu el la ĉefaj konservativaj principoj. „Mediaj problemoj, kiuj alfrontas la tutan mondon, postulas adekvatan reagon de tuta mondo. Ili tuŝos ĉiun landon kaj neniu povos eviti ilin. La industriaj pli evoluitaj landoj devas kontribui pli por helpi al tiuj, kiuj industrie evoluitaj ne estas,“ ŝi deklaris en UN.

Laŭ memoroj de Jonathon Porritt, media aktivisto, kiu estris Friends of Earth en malfruaj 80-aj jaroj, ŝi faris pli ol iu alia, por ke ŝi faru el tiuj problemoj politikan temon. Jonathan Porritt rememoris: „Kiam en 1987-88 ŝi komencis paroli pri ozona truo, acidaj pluvoj kaj klimatsanĝo, multe da homoj, kiuj asertis, ke tiuj problemoj estas por stranguloj, kiuj brakumas arbojn, komencis pensi: Ho ve, sinjorino Thatcher diras tion, tio devas esti grava.“ Thatcher ankaŭ avertis: „Dum du jarcentoj ekde la tempo de klerismo ni supozis, ke senrigarde la evoluon en scienco, ekonomio aŭ kresko de nombro de homoj, la mondo daŭrigos pli-malpli same. Tio estis progreso. Tion ni volis. Kaj nun ni scias, ke tio ne plu validas.“

Halti klimatan malstabiligon kaj forlasi fosiliajn fuelojn estis por ŝi demando de respondeco al venontaj generacioj, vivmedio, sed ankaŭ la kialo estis ekonomia – agi nun estos pli avantaĝa ol poste kalkuli damaĝojn. Thatcher ankaŭ konstatis: „Ĉiam ni devus prikonsideri, ke libera merkato estas mezuro por atingi celon. Se ĝia influo havus kiel sinsekvon pli damaĝoj en vivkvalito pro la poluado ol plusoj el produktado de varoj kaj servoj, ĝi perdus sian sencon.“ Ŝi fakte sciis, ke en la kazo de mediaj problemoj ni alfrontas tion, kion ekonomistoj nomas negativaj eksteralaĵoj, alivorte malfunkciado de merkato, kiu ne kapablas en ĝiaj kalkuloj inkluzivi sekvojn al vivmedio. „Ni ne devas lasi deflankiĝi en nefruktodonaj kaj disigitaj kvereloj,“ ŝi diris en 1990. „Por tio estas tro malmulte da tempo.“ Kaj ŝi postulis obligaciajn globalajn planojn por malkreskado de emisioj, kiuj estas eldevigataj.

Thatcher volis, ke la mondo atingos ĝis 2005 la nivelon de emisioj el 1990. Redukton de emisioj ŝi prenis kiel sekuron kontraŭ vico de neantaŭvideblaj faktoroj, kiujn la klimata malstabiligo povas alporti. Por ŝi tio estis esprimo de konservatismo. En la sama tempo ŝi ankaŭ konsilis humilecon al naturo: „Hodiaŭ ni lernis pri humileco kaj respekto al natura balanco. ... La racio estas specifa donaco de homaro... Nun ni devas uzi nian racion por tio, ke ni trovu manieron, kiel vivi kune kun naturo kaj ne domini al ĝi.“

Sed ŝi ankaŭ komprenis, ke tio ne estos facila: „Nia kapableco kuniĝi, por ke ni haltu aŭ reduktu damaĝadon de monda vivmedio, estos klare la plej granda provo de tio, kiel vaste ni kapablas trakti kiel monda komunumo,“ asertis Thatcher.

Tamen en malfrua aĝo Thatcher trairis grandan opinionan ŝanĝon. En 2002 en siaj memuaroj ŝi eĉ avertis antaŭ la granda konspiro kun celo krei socialisman mondregimon sub preteksto de klimata protektado. Kio kaŭzis tion?

Se ni rigardos en memuaroj de Thatcher, ni eklernos, ke ŝi referencas al homoj kiel Richard Lindzen, Arthur Robinson, Julian Robinson el penskomisionoj kiel Heritage Foundation, Cato Institute aŭ IEA. Kio ilin kunigas? Ili estas pagataj de fosilia industrio. Julian Morris laboris por Institute of Economic Affairs (IEA), unu el la unuaj neoliberalismaj penskomisionoj, kiu ricevis monon minimume ekde 1967 de olea giganto British Petrol, pli poste eĉ de ExxonMobil kun celo de influado de politikistoj. Morris laboris kaj fondis aliajn organizaĵojn, kiuj ricevis fontojn de aliaj fosiliaj korporacioj kiel ExxonMobil aŭ Koch Industries. Same faris Fred Singer kaj Richard Lindzen. Fosilia industrio nome komence de 90-aj jaroj ektrovis, ke oni kliniĝas al ĝia regulado kaj komencis mobilizi siajn aliancinojn. Malgraŭ tio, ke konservativaj estroj de Okcidento (Thatcher kaj Bush sen.) estis unuaj klimatalarmistoj, tio sub la premo de lobiistoj ŝanĝiĝis en kontraŭo.

Fosilia industrio masive eniris en strukturoj de ĉefe konservativaj kaj neoliberalaj organizaĵoj, kiuj kontraŭis reguladon por ideologiaj kialoj. Kaj per ili ĝi disvastigis dezinformojn kontraŭ klimata scienco kun helpo de know-how de tabaka industrio.

Kreo de informnebulado estas la ĉefa kialo, kial la mondo ne sukcesis antaŭhaltigi danĝeran klimatan malstabiligon. Tio estas videbla eĉ ĉe ni (Ĉeĥa respubliko), kiam ŝatanto de Thatcher Jan Skopeček apartenas al politikistoj, kiuj obstine obstrukcias klimato-politikon.

Pri la problemo de globala varmigo ni scias ankaŭ danke al konservativaj estroj, kiel estis Margaret Thatcher, kiu avertis pri ĝi jam antaŭ pli ol 35 jaroj. Bedaŭrinde ilia heredaĵo estis superigata de propagando de fosilia industrio, kun kiu kunligiĝis iliaj sekvantoj.

Fonto: <https://x.com/VojtechPecka/status/1777655477876203610>

Tradukis Josef Kalčík

Posthomoj

Blanka Hužerová

Hodiaŭ homoj demandas saĝajn brakhorloĝojn, ĉu ili bone dormis, kiom da paŝojn paŝis, kiom da kaloriojn akceptis el manĝo, kia estas vetero, per kiu vojo iri, kion fari ... Nur mallonga tempo sufiĉis kaj ni perdis gravan aferon: demandi nin: kiel vi dormis? Kiel vi fartas, sentas agrablan sunon? vintron? gutojn de pluveto? bloveto? Strangan vivon ni vivas. Dum promeno kun mia hundeto mi fermis okulojn kaj sentis venteton en branĉoj de arboj kaj eksciis ĉion, kion homoj perdas. Ĉu tio al ili mankas?

Ŝajnas, ke „edukita“ samtempa homo bezonas iun, kiu gvidus lin ... ĉu tio povas esti religio? Verŝajne ne. Gvidas lin manipulo per reklamoj, elektronikaj iloj, TV ..., kiuj penetras subsojle kaj konstante ilian cerbon. La dio ne mankas al ili. Ili ne scias pri li. Multaj jam akceptis anstataŭ Dion artefaritan inteligencon. Ĉu ili estas ateistoj? NE! Ili estas posthomoj!!

Premioj por esprimlibereco

Tomáš Břicháček

La 20-an de novembro 2024 estis unuafoje anoncitaj la gajnintoj de la Premioj por esprimlibereco. La celo de ĉi tiu projekto, iniciatita de la Asocio por Defendo de Esprimlibereco, estis montri kaj aprezi ekzemplojn de kuraĝaj individuoj kaj organizoj, kiuj longtempe subtenas la malpliigantan liberecon de esprimo kontraŭ silentigado de nepopularaj opinioj.

La kandidatojn povis proponi la ĝenerala publiko ekde marto ĝis oktobro. La gajnintojn elektis ĵurio konsistanta el famaj personoj, precipe el la kampo de la amaskomunikiloj; sed inter la membroj estis ankaŭ la ombudsmano Stanislav Křeček.

Gajnintoj en la kategorio „individuoj“ estis:

- Petr Drulák;
- Lukáš Pollert;
- Cecílie Jílková;
- Jiří Beran.

En la kategorio „organizoj“ estis premiitaj:

- Instituto Václav Klaus;
- Echo24.cz;
- SMIS – Asocio de Mikrobiologoj, Imunologoj kaj Statistikistoj.

Specialan dankon ricevis Oldřich Kužílek pro kunaŭtoreco de la leĝo n-ro 106/1999 pri la libera aliro al informoj, kaj pro meritoj pri pli granda malfermiteco de publika administrado.

Mi konsideras ĉi tiun iniciaton tre dezirinda, kaj la Asocio por Defendo de Esprimlibereco meritas grandan dankon pro ĝi. Se mi devus elekti unu el la bazaj civitanaj rajtoj, kiun mi pensas esti nuntempe plej minacata, tio certe estus la libereco de esprimo. La premo kontraŭ ĝi venas de pluraj flankoj, ĉu temas pri la batalo kontraŭ misinformado, subpremado de malamecaj esprimoj, nuligokulturo (cancel culture), aŭ ĝenerale politika ĝusteco (political correctness).

Ni estas atestantoj de provoj ekskludi nepopularajn opiniojn el la publika diskuto, silentigi ideologiajn kontraŭulojn kaj de ilia skandaligo, timigo kaj reedukado. Tial ni devas firme kaj nekompromise defendi la liberecon de esprimo kaj esti atentemaj pri la nuntempaj atakoj kontraŭ ĝi aŭ ĉiuj provoj tranĉi ĝiajn flugilojn. La ambiciojn de la modernaj cenzuristoj necesas haltigi, antaŭ ol estos tro malfrue.

Rakontoj kaj eseoj

Jindřiška Drahotová



Miaj rememoraĵoj pri akvo

Mia grava rememoraĵo devenas el lernejaj jaroj, kiam mi en lernolibro vidis simplan desegnon de cirkulado de akvo en naturo. Ĝi ravis min. Mi tute ne memoras, en kiu libreto ni tion trovis, kiu instruisto instruis pri cirkulado, sed tiu okazo, kiu senĉese konstante okazadas, sen ago de homo min profunde influis.

Post kelkaj monatoj dum printempaj ferioj mi staris sur deklivo en montaro *Krkonoše* kaj rigardis pinton de la monto *Kokrháč* parte kovrita per nebulo kiel en grandioza

sonĝo. La suno radiis sur mian korpon, ĉe miaj kruroj degelis peza neĝo. Sur deklivo ekestadis etaj rojetoj kaj sur senneĝaj insuletoj el sekaj herboj penetradis folioj kaj floretoj de galantoj. En mia animo mi sentis povegon de la naturo, kie la akvo estas tiu plej grava. Mi staris en tiu beleco kaj sur la ĉielo aperis ĉarma ĉielarko.

Post dek jaroj sur la sama deklivo mi estis sorĉita per akvo, kiu konstante trafluadis el tubo ene la kabano tra uĝego, de kie ni prenadis la akvon kaj uzis ĝin, eĉ trinkis ĝin. Pliaĵo de la akvo forfluis el kabano per tubo libere sur deklivon. Tiu ĉi akvo estis tute alia ol tiu de krano en urbo. Ĝi estis iel senkatena. La sono de la akvo penetradis tutan kabanon eĉ dum frostaj noktoj. Mi pensis pri sorĉo, ĉar la akvo fontas inter rokoj sur la monto kaj fluas suben. Kiel ĝi povas supre fonti kaj konstante forflui dum varmegaj someraj tagoj?

Se mi en lernejo ne eksciis pri fotosintezo de plantoj (lumo, varmo, akvo), eble mi pensus, ke estas kompreneble kaj normale, ke plantoj kreskas, sur tero kuras bestoj kaj vivas ĉi tie homoj. Sed sen plantoj ne povas ekzisti bestoj nek homoj, sen akvo certe ne – kiel saĝa, grava, kiel nobla kaj surpriza la akvo estas!

Mi rememoras mian infanan sperton, pri kiu mi ankoraŭ al neniuj rakontis. Mi ludadis en korteto ĉe urba domo. Miajn trezorojn, diversajn boteletojn kaj krisoletojn, mi kaŝadis inter ligno por hejti. Kun proksimiĝinta vintro kaj frostoj la akvo en boteletoj frostiĝis. Mi miris, ke la akvo, kiam frostiĝis, iom post iom eliradis el boteletoj. Kiam mi foje unu boteleton

prenis en mian manon, ĝi frakasiĝis je mil vitreroj. Kun mirego mi tenis en mano frostitan pecon da akvo, kiu pligrandigis sian amplekson kaj rompis botelon el dika vitro.

Mi amas riveron, kiu fluas en nia urbo. Ĝi estas viva, nekatenta, pura. Printempe ĝi regule leviĝas el bordoj. Ofte ni vizitis ĝin en diversaj lokoj de ĝia vojo. En flukurbiĝo la rivero kreas en sia mezo sablan insulon, kiu ĉiujare ŝanĝas sian formon. Eĉ dum varmegaj someroj la akvo en la rivero estas tre malvarma, rapide fluanta. Mi rememoras, kiel la rivero majeste kondukis, kiam ĝi leviĝis el bordoj kaj rapide disfluis trans herbejoj kaj prenis ĉion, kio baris ĝin. Ĝia koloro ŝanĝiĝis al bruna kaj estis danĝere enveni ĝin. Iam venis tiel forta torento, ke dum momento la akvo kaptis miajn kruojn kaj mi nur malfacile savis min. Miaj ŝuoj restis en koto de bordo...

Dum mia vivo mi vidis riveregon Neva en Peterburgo. Ĝiaj pontoj, kiuj vespere malfermiĝas, estas mirindaj. Mara tajdo pelas siajn ondojn sur ŝtupojn en urbaj bordoj. Dum nokto ĝi estas belege lumigita kaj majestaj ŝipegoj trairas sub malfermitaj pontoj. En meandroj mi vidis senmovan akvon kaj kadavrojn de bestoj.

Mi vidis riveregon Tamizo en Londono ĉe konata ponto, sed mi flaris malagrablan malodoron. Sur la surfaco de la rivero flosis multego da plastaj forfalaĵoj. Mi vidis Baltan maron, maron en Dalmacio, Nigran maron, Golfan fluon, Mediteraneon, sed kio fascinas min pli, estas kunfluo de la rivero Elbo kaj Vultavo ĉe urbo *Mělník*. La akvoj de tiuj riveroj kuniĝas, sed ĝiaj koloroj ne miksiĝas, Tion povas homo rigardi ĝis horizonto. La akvoj de la Vultavo estas pli fortaj ...

Nu, *Jizera* estas mia amo – rivero de mia naskiĝloko.

Nun, kiam mi ne tro ofte forveturas de mia loĝejo, mi almenaŭ observas akvon, kiu forfluas el lavujo kaj turniĝas en la direkto de horloĝaj montriletoj. Onidire sur suda tera hemisfero forfluganta akvo turnas sin male. Kiel kondukas la akvo sur ekvatoro mi trovis en interreto – ĝi fluas rekte sen turniĝo.

Miaj du monatoj kvazaŭ kun AI

Mi mastris familion, mi sola. La hejmo funkciis brile, kiel bone oleita maŝino. Anoj de mia familio ĝuis komforton kaj kvieton. Mia agado alportis al mi ĝojon. Mi ne miris, ke neniu aprezas nian bonegan laboron per takso, laŭdo aŭ diplomo, eĉ ne per kareso, ĝis momento, kiam agresis kovimo 19 kaj mi ekfebris, apatie kuŝiĝis kaj soifis. Senmove mi kuŝis kaj petis teon por trinki. Oni demandis min, kie trovi kruĉon kaj kiamaniere en ĝi verŝi akvon. Jes, oni sukcesis poste alporti varmegan maldolĉan nigran teon en kruĉo, sed oni ne verŝis la teon en poteton. ...

Post tri tagoj de malespero per lastaj fortoj mi akre postulis veturigi min al hospitalo. Starinte el lito mi falis kaj ekploris. Ano de familio, funkcianta kiel ŝoforo senvorte veturigis min al enirejo de la hospitalo, kie laboristoj renovigis pordon kaj li tuj forveturis. Mi tiris sakon tra longa koridoro, ĝis tute elĉerpita kun karteto de sociala asekuro en mano mi eksidis sur benkon. Rimarkis min preterpasanta oficistino kaj mire diris: „Vi estas eksa ĉefflegistino, kio okazis al vi?“ Mi hontis, ke mi estas sola kaj senkonsila kaj mi diris: „Mi venis per taksio,“ kaj preskaŭ svenis.

Venis helpanto kaj kun ĉareto li veturigis min en urĝan konsultejon. Komencis akcepta esplorado rapida kaj profesie perfekta. Soifis mi enorme, sed glason da krana akvo, kiun ili al mi alportis, mi ne kapablis teni. Oni pesis min, mi perdis dek kilogramojn. Mi frostis. En brakon oni pikis al mi infuzaĵon. Vivdonanta diafana likvaĵo komencis guti. La unuajn vortojn de sanistoj mi aŭdis nun: „Vi kovimas.“ Tute mi ne interesiĝis pri tio. Mi vivis tute pasive, sen povo pri io interesiĝi.

Finfine oni metis min en ĉareton kaj veturigis min longe tra koridoroj kaj per kelkaj liftoj kaj ĵetis min sur lito. La ĉambro estis granda. Sur alta plafono lumis sep rondaj grandaj plataj lumiloj. Estis sep grandaj fenestroj kaj apud mia lito estis unu neokupita lito. Unu angulo estis ovala. Mi ekkonis, ke mi estas en tute nova konstruaĵo, multetaĝa. Venis personoj en blankaj kombinezoj, senvorte aranĝis sur min plurajn tubetojn rapide kaj lerte, ŝaltis aparatojn antaŭ mia kapo. Kurte ili diris, ke ili venados regule, ke ne taŭgas voki ilin. Tio estis lastaj homaj vortoj, kiujn mi aŭdis por longa tempo.

Mi kuŝis sur komforta lito senpove. Spite de tio, ke eblis per elektra ilo levi parton de la lito por sidi, mi ne kapablis tuŝi la butonon. Miloj da pensoj venadis al mi pri mia estonto: kio okazos se ... se ... se ...

Senvortaj blankaj fantomoj venadis, alportadis manĝon taŭgan por laborantaj homoj kaj forĵetadis ĝin en specialan vazon por detruigi ĝin kiel danĝeraĵon. Teon verŝi el granda kruĉo en poteton faris al mi problemojn. Mi soifis tre, sed malagrablaj gustoj en buŝo estis hororaj kaj mia dekstra mano nelerta, kaj la dua brako estis katenita per tubetoj kondukataj medikamentojn. Tubo por fordukti urinon volvis mian kruron. Aliaj senvortaj fantomoj venadis matene kaj lavis mian korpon. Ĉiuj laboris per profesiaj, rapidaj ŝparemaj movoj sen iu ajn vorto. La plafonaj lumiloj lumis konstante tagenokte. Mi ne sciis, ĉu estas tago aŭ nokto. La tempo pasis per mallogaj sonetoj de aparatoj kvazaŭ akvaj gutoj por frenezigo de martiro. Nur iam eble vespere malleviĝanta suno ruĝe kolorigadis fenestron.

Iun tagon mi ekscitis, sidiĝis kaj rampis el lito. La tubetoj el brusto deglutis kaj aparatoj komencis brui. Mi ilin alglutis, aparatoj silentiĝis, neniu venis. Mian penson penetris ideo: Min flegas artefarita inteligenco, ĉar ĉio

perfekte okazas, neniu demandas pri mia volo, oni ŝanĝas medikamentojn sen mia permeso, sen intereso kiel mi fartas. Kiam venis fantomo, mi demandis: Kiel nomiĝas la medikamento, kiu venas en mian vejnon? Mi ricevis ne respondon, sed demandon: Kial vin tio interesas?

En tiu momento mi perdis fidon al realo. Mi vekigis por atente ekribeli. Kaptis min morteca timo pri mia estonto kaj mi kolektis ĉiujn miajn fortojn mensajn kaj korpajn. Kun plena sako da urino en mano mi malrapide ellitiĝis, timante falon kaj kun penego mi movigis la liton al fenestro kaj metis vizaĝon sur vitro de fenestro. Mi vidis, ke mi staras en etaĝo alte super ĉefa urba bruoplena strato. Sur domo kun grandaj ornamitaj montrofenestroj kontraŭ hospitalo mi legis grandan surskribon: „Funebra instituto“. Miaj kruroj preskaŭ perdis forton subteni min kaj mi falis reen sur liton. Mi komencis krii kaj denove mi sinkis el lito kaj tre laŭte kun ĉiaj miaj fortoj mi parolegis: Se vi min lasos kuŝi sen eblo movi, kun tiu idiota senĉesa TV kaj muziko, sen homa vorto, kun konstanta ripetado de ĉiam samaj tagaj programoj, vi estas jam nun murdistoj de homoj, profesie perfektaj ... kaj mi kriis, ĝis mia plena elĉerpiĝo. Fantomoj venis en sia regula tempo. Ili staris, ne atakis min. Post ia tempo alportis al mi ilon por paŝi kaj viŝis urinon, kiun mi disverŝis planken, kiam mi eligis urinan tubeton el korpo.

Miaj muskoloj perdis sian forton kaj la korpo pezon. Kun lasta peno kaj volo mi sidiĝis kaj poste stariĝis kaj klopodis fari kelkajn paŝojn. Post ia tempo oni min transportis sur liton en ĉambron por maljunulinoj, kiuj senespere sence ion babilis al si mem. Mi rapide pliboniĝadis kaj personaro parte eksterlanda, parolanta neperfekte nian lingvon, rigardis min kun malfido, kiam mi klopodis iel helpi al miaj kunmalfeliĉulinoj apud mi kuŝantaj.

Baldaŭ hospitala aŭtomobilo veturigis min hejmen. La loĝejo estis senhoma, silenta, atendante mian zorgon kaj flegon. Ĝi min ŝate akceptis kaj mi ĝin impresdone kun larmo reprenis. Por mi komenciĝis nova vivo en novaj kondiĉoj en malnovaj spacoj sub strangaj kondiĉoj, kie homoj demandas saĝajn brakhorloĝojn, ĉu ili bone dormis, kiom da paŝoj paŝis, kiom da kalorioj akceptis el manĝo, kia estas vetero, per kiu vojo iri, kion fari ... mendas manĝon hejmen kaj pagas senmone, komunikas per aparatoj mem arestitaj en soleco ...

Ĉu ili vivon vivas?

Mi sur hospitala lito revis pri agrabla suno, freŝa neĝo, pluvaj gutoj sur vizaĝo, bloveto en branĉoj de arboj, aromo de floro, krio de birdoj, atentemo de preterpasantoj, proksimuloj ... kaj kion mi vidas ĉirkaŭ mi? Ĉu tio ĉio, pri kio mi revis, al homoj ne mankas? Ĉu ili ne scias, ke perdas, kaj denove kaj denove perdadas belajn emociojn komfortajn por animo, por tio, kio estas por homo VERA VIVO?

Konkursa travivaĵo

Kiam oni anoncis literaturan konkurson por senioroj por la jaro 2019 en loka klubo *Klementinka*, kun temo: **Mia malmemorebla travivaĵo dum libertempo aŭ ferio**, mi ekpensis. Jes, temas pri dekoj kaj dekoj da ferioj, libertempoj, festotagoj ligitaj al semajnfinoj. Eble tiaj travivaĵoj estas centoj en mia aĝo. Kaptis min volo elekti al mi tiun unikan travivaĵon.

Kiel ordema virino, mi unue volis kolekti kaj vicigi, analizi la travivaĵojn. Nur poste mi la ĝustan travivaĵon certe elektos.

Mi komencis per infaneco. Rememoraĵoj surprize aperadis rapide, klare, koloraj, kun aromoj kaj gustoj. La personoj kaj medio estis agrablaj, intime konataj:

Ĉe mia kara avino Aloisie en vilaĝo *Skalsko* en tiu tago estis varmo kaj maturadis prunoj, grandaj, grandegaj sukaj, bedaŭrinde, ve! – mi ŝteladis ilin. Pri tio mi neniam konfesis, sekrete mi ilin formanĝis. Ĝis nun krom tiu ĉi papero neniu sciis pri tio.

Ĉe mia vilaĝa avino Anna el *Bezdědice*, patrino de mia patrino, la ferioj somere estis laboraj, mi multe lernis por vivo. Oni bakis panon en grandega forno, rikoltis grenon, papavon, linon, senplumigis anserojn, manĝigis porkojn, sed estis sufiĉe da tempo kuradi en arbaro kaj ĝardenoj kun infanaro. Mi eĉ povis rigardi naskon de bovido, eĉ bebo homa.

Tre bone mi memoras brilajn ferion ĉe onklino Marta en ŝia dometo, preskaŭ kabano algluita sur roko. Ŝi bakis dolĉegrasajn tortojn kaj satigajn manĝojn en tempo postmilita, kiujn mi kiel urba knabino tute ne konis. En memoro restis al mi ŝia ĝardeneto super staloj kaj staletoj ĉizitaj en roko, kie sur nuda mallarĝa roko sur sterko de ŝiaj bestoj kreskis riĉe bela legomo. Ankaŭ mi rememoras ŝiajn du oksojn kun enorme longaj kornoj. Dum ili pace revenis post laboro en sian stalon kun mallaĝa pordo, ili turnis kapon flanken por enveni. Mi admiris ilin. Mi admiris ĉion, ĉar ĉio en onklina dometo estis utila, saĝe uzata, nenia malŝparo.

Ferio ĉe onklino Jarĉa estis tute alia. Ŝi posedis grandan belan domon ĉe lago. En lago mi lavis makulitajn bindojn de miaj du malgrandaj kuzinoj kaj grandaj karpoj venadis kaj manĝis enhavon el bindoj. Tie mi vidadis belan knabon. Li nomiĝis Herbert. Lia voĉo havis germanan akcenton. Li tre plaĉis al mi. Li kaptadis fiŝojn en la lago. Ŝtele ni rigardis unu la alian. Mi estas certa, ke lin mi rekonis eĉ hodiaŭ ...

Mallonga ferio ĉe onkloj Pepik kaj Marula en *Kamenický Šenov*, la medio tre malsimilis. La onklo estis akademia pentristo kaj volis, ke mi parolu ĝuste laŭ normlingvo. En lia vilao estis nombro de belaj vitraj aĵoj, kiujn mi neniam vidis kaj konis, eĉ gastoj tie estis iel aliaj.

Mirindan rememoraĵon mi travivis kun onklo Lád'a. Estis vintro kun freŝa neĝo. La onklo volvis min en pelton kaj sidigis min en ĉevalsledon. Sur amaso da neĝo kaj faletadaj neĝeroj en freŝa vento ni veturis kiel konkurse,

nigra ĉevalo galopis, sonoritis tintiletoj. Jam neniam plu mi spertis tian freŝan aeron. Tian unikan senton! Okazas al mi, kiam venas al mi bela sonĝo, ĝi alvenas el tiu vintro.

Post horoj de dolĉaj rememoradoj venis vespero. Mi decidis, ke morgaŭ mi daŭrigos kaj rememoros libertempojn. Kun tiu ideo mi ekdormis.

Nokte venis al mi sonĝo. Ĉe mia lito staris grandega alta ceramika vazo por fermentigo de brasiko. Mi ellitiĝis por levi kovrilon de la ujeĝo kaj oportune enrigardis, kio estas en ĝi. El ĝi fulme aperis rememoraĵo pri libertempo en Hungario, kien ni kiel novedzoj vojaĝis per skotero pasi nian unuan eksterlandan libertempon ĉe lago Balatono kaj kie ni abunde fabele manĝis en gastejoj – ĉardoj kun amikoj. Sed tuj post la rememoraĵo hastis alia rememoraĵo pri varma sablo en kroata Split. Kune kun pluraj aliaj rememoraĵoj elsaltadis kiel fajrejoj sentoj, aromoj, detalaĵoj, streĉoj, koloroj, vizaĝoj de homoj kaj iliaj sortoj. Ĉio aperadis nekredeble klare kaj ekzakte, tumulte. Mi rapide la vazon kovris. Sed post ia tempo mi denove la kovrilon levis kaj rememoraĵoj elŝprucis kiel bengala fajro, puŝigadis sin eksteren, kriis, kverelis. Laŭte vokis: Mi el Svedio, mi el Vilno, mi el Francio, mi el Aŭstrio, mi el Frankfurto, mi el *Banská Bystrica*, mi el Litomiŝlo, mi el pola maro, mi el Ostendo, mi el Montpeliero, el Bretonio, el Florenco, el *Spiš*, el Berlino, el Nitra, el Verona, el Islando, el Leningrado, mi el Minsk, el Gento, el *Jizera* montaro, el Lisbono, el ... Mi ŝtopis miajn orelojn kaj eskapis en liton sub kovrilon.

Matene min vekis suneto kaj mi jam sciis, ke tiu malmemorebla travivaĵo al mi ankoraŭ ne okazis, sed ĝi okazos kaj mi jam sciis, kiel mi ĝin realigos. Mi konsiliĝos kun interreto, ĉu ekzistas ankoraŭ busa haltejo ĉe „Morta vojo“, kie staras kruco inter malnovaj tilioj sub vilaĝeto *Bezdědice*. De tie mi iros rekte al solejo *Ratkovice*, poste suben al valo, al Cigana ŝtono. Tie ĉe akvoĉerpejo mi turnos min maldekstren kaj per herbeja vojo iros laŭ valo plu al „Forbrulita muelejo“, de kie devenis mia praavo, ĝis *Petrovina*, la nesto de rabistoj, pri kiuj verkis en sia libro Karel Sellner. Eble mi iros ĝis *Sudoměř*, kie estas malgranda fervoja domo kaj eta interesa fervojista muzeo. Nur kvar haltejoj kondukas al *Boleslav*, kie estas mia hejmo.

Por tiu vojo mi aĉetos tiajn du modernajn bastonojn. Amikino diris al mi, ke sanasekuro eble repagos la prezon de bastonoj al mi.

Sano de nia cerbo dependas de socia interago. Ju pli malmulte la homo estas socie aktiva, des pli li perdas el cerbo la grizan mason sur sia cerbo, kiu akceptas informojn. Do, bazo por teni cerbon en bonaj kondiĉoj, estas interrilatoj kun amikoj kaj proksimuloj, ĉar nia cerbo tielmaniere kreas novajn vojojn inter cerbaj ĉeloj kaj helpas al aktiveco. Nia cerbo tiel restadas akceptanta lernadon **en ĉiu aĝo**.

Mallonga eseo

Unue oni devas nomi, kiu estas ateisto kaj kiu estas kredanto.

Se ateisto estas serĉanto de leĝojn de naturo, reguloj en socio, pensas pri tasko de homo sur planedo, li ekscias, ke dio ne bezonas eklezion. Nur matura homo povas deklari, ke sentas sin ateisto laŭ siaj spertoj kaj post vera pripensado. (mia imago)

Se kredanto (matura homo) nepre bezonas kondukanton, peranton por „paroli“ kun dio, tia homo estas influata de aliaj homoj (eklezio). Ĝis matureco infanoj kaj junularo nepre bezonas edukadon por kompreni multajn rilatojn en naturo kaj en socio. Nur poste la homo elektas kredon kaj komunan kulton, kie li sentas sin komforte.

Nun ambaŭ povas kunvivi en harmonia socio. (mia imago)

Sed realo estas komplika, tre komplika. Ŝajnas al mi, ke homaro matura ne estas, ĉar ofte egoismo, malamo, agreso, moko, superstiĉoj staras kontraŭ racio.


Antaŭ ol mi komencis tiun ĉi eseon, mi partoprenis prelegon pri artefarita inteligenco. Ĝi ĉirkaŭas nin pli, ol oni scias. Mi dum prelego aŭdis, ke mi plu ne bezonus verki tiun ĉi artikolon, sufiĉus, ke mi donos informojn pri mi, pri mia stilo, difini longecon, kaj al kiu la tekston oni direktas kaj finite! La artikolo verŝajne estos pli kvalita ol la mia.

Kun forta energio tiuj lektorinoj junulinoj faras „sian“ laboron, subtenataj de korporacioj. La riĉa manĝrefreŝiĝo ne mankis.

Vespere mi revenis en mian fotelon kaj prenis en manojn libron de Trevor Steele – „Dio ne havas eklezion“ kaj konstatis: Kiu strebas esti dio, tiu detruas homaron, ĉu estas kredanto, ĉu ateisto.



100 jaroj ekde la naskiĝo de Josef Škvorecký



La 27-an de septembro 2024 pasis cent jaroj ekde la naskiĝo de la elstara ĉeĥa verkisto Josef Škvorecký. Ni rememorigu lin per la vortoj, kiujn pri li skribis la eksa ĉeĥa prezidento Václav Klaus.

„Josef Škvorecký estis kaj por ĉiam restos tute eksterordinara fenomeno de la ĉeĥa kultura kaj socia vivo en la dua duono de la dudeka jarcento. Kiel mi diris pri li en Náchod dum lia okdekjariĝo, li estis „**libera homo en nelibera mondo**“. Ne nur pro sia riĉa, ĝenre kaj teme multfaceta verkaro, sed – aŭ eble precipe – pro siaj vivaj starpunktoj. Li ne apartenis al tiu plimulto de ĉeĥaj intelektuloj,

kiuj devis sperti membrecon en la komunista partio por kompreni sian eraron, sed li apartenis al tiuj malmultaj, kiuj ĉiam intuitive komprenis, ke libereco kaj komunismo ne povas esti kunigitaj.

Josef Škvorecký estis solulo, kiu en niaj plej malfacilaj tempoj de nelibereco enportis al ni la spiriton de usona konservativismo kaj liberpensado. Eĉ en sia kanada ekzilo, post la sovetia okupado de Ĉeĥoslovakio, li ne nur ne perdis kontakton kun sia patrujo, sed li laboris por ĝi kaj por ĝia estonta libereco kiel malmultaj aliaj. Mi ofte rememoras niajn renkontiĝojn en Usono – ĉe Cornell kaj ĉe Berkeley – printempe de 1969.

[...]

Per sia verkaro kaj per sia elstara ekzemplo de civitanaj kaj homaj starpunktoj Josef Škvorecký restos kun ni ankoraŭ longe. Mi krome kredas, ke tio validas ne nur por la generacioj, kun kiuj li dividis la tumultajn sortojn de nia lando en la dua duono de la dudeka jarcento kaj la komenco de la dudekunua jarcento.“

Václav Klaus (2012)

Fonto: <https://www.klaus.cz/clanky/3012>

Tradukis Tomáš Břicháček

„Odedávna jsem přesvědčen, že jeden z hlavních důvodů, proč se u nás zhroutil totalitní režim, bylo to, že legálně bylo možné dopracovat se úspěchu a s ním spojené zasloužené renumerace jen uměním – pokud byl člověk ochoten respektovat omezení, která starý režim umělcům ukládal, a pokud se umělci podařilo proklouznout bez nehody cenzurní sítí.

Lidé ovšem mají různé talenty, nejen umělecký. Jenomže těmi ostatními talenty – pokud člověk nebyl aktivním členem oné významné organizace – bylo možné dosáhnout ne snad úspěchu, ale alespoň vydělat slušné peníze pouze nelegálně. Obchodní talent šlo se značným ziskem uplatnit jenom na černém trhu, lékařský talent, když si doktor doplňoval příjem úplatky, talent v některém ze žádaných řemesel, pokud se řemeslník nebál brát melouchy, a když se nebál, musel v pracovní době odpočívat, protože jakmile ve státním podniku padla, čekala ho perná práce. Že jsem v tomhle podezření měl pravdu, ukázalo skutečně bouřlivé uplatnění těch jiných talentů, nejen těch uměleckých, po Sametové revoluci.“

Josef Škvorecký (2004)



Statuo de Josef Škvorecký en Náchod (Norda Bohemio)

Ŝtefanik en Afriko

L. N. Zvëřina



La servistoj alportadis manĝojn sur la tablon, kaj Ŝtefanik rigardis ankoraŭ la marmorajn panelojn inter la kolonoj, en fabela palaca korto de Abd-el-Bahara. Li neniam estus pensinta, ke en oazo, kia estis Laghouat, li trovos tiel luksan restadejon. Oni sidis en malfermita manĝejo, apartigita de la korto nur per gracia kolonaro. En la korto murmuris fontano ŝprucanta akvon en rozkoloran basenon. Sur ĝia barilo sidis kelkaj flutistoj kaj fajfistoj eligantaj melankoliajn tonojn, kiuj aspiris esti muziko.

„Bonvolu, sinjoroj,“ invitis siajn gastojn Abd-el-Bahar, sidanta ĝuste kontraŭ Ŝtefanik. Li estis pura araba tipo kun severa sinteno kaj gestoj de naskita suvereno, kio devenis de la potenco, kiun li havis kaj de la respekto, kiun li ĝuis. Li ja estis la ĉefo de la sudalĝeriaj gentoj kaj Francujo sciis, kiun ĝi subtenas en lia persono.

Ŝtefanikon konatigis kun li kolonelo Geoffroy, la vicgubernatoro, kiu estis lia plej bona konsilanto depost lia alveno en Laghouat. Ĉi-vespere li sidis ĝuste apud li. Ĉeestis ankoraŭ du altranguloj.

La konversacio turniĝis denove ĉirkaŭ la tasko de Ŝtefanik, fondo de observatorio.

„Kaj kia estas la opinio de la sinjoroj, ĉu mi povas scii?“ demandis Abd-el-Bahar, donante al la flutistoj signon, ke ili ĉesigu la muzikon.

„Mi pensas,“ respondis Ŝtefanik, „ke ankaŭ mi aprobos la konvinkon de nia gubernatoro kaj de mia ŝatata konsilanto kolonelo Geoffroy. Laghouat estas belege kuŝanta loko, havas taŭgan altecon, idealan atmosferon – sed la malfacila transporto malhelpas la efektivigon de la plano...“

„Mi tre ŝatus vidi vian entreprenon ĉe ni.“

„Nu, tio dependas nur de la registaro, ke ĝi permesu necesajn investojn.“

„La komunikado inter Alĝerio kaj Laghouat,“ aldonis ankaŭ la kolonelo, „estas ja delonge projektata. Per ĝia realigo estos samtempe solvita la problemo pri la observatorio.“

Nun, post mansigno de Abd-el-Bahar, la flutistoj kaj la fajfistoj rekomencis plenforte. La kolonelo eluzis la okazon kaj kliniĝis al Ŝtefanik: „Sinjoro doktoro, nia bejo volas surprizi nin hodiaŭ. Post momento li prezentos al ni sian *Madame* kaj ŝi ludos al ni fortepianon.“

„Madame? Kaj fortepianon? Ĉu lia edzino ne estas arabino?“

„Ne. Lia edzino estas francino. La bejo ĵaluze kaŝas ĉi tiun sekreton: Kaj ĝuste tiu ĉi francino volas hodiaŭ paroli kun vi, volas esprimi al vi gravan deziron.“

„Al mi?... Sed ŝi ja eĉ ne konas min.“

„Mi jam rakontis pri vi al ŝi. Mi mem, estante registara komisiito, neniel povas ŝin helpi. Eble vi povus.“

„Sed ankaŭ mia sendo estas oficiala“, oponis Ŝtefanik.

„Nu, vi vidis. Mi jam prizorgis, ke la bejo kun siaj altranguloj estu forvokita dum la koncerto – kaj ni kun Madame solaj. Cetere.“

La muzikado ĉesis kaj la kolonelo tuj eksilentis. Nur mallaŭte li ankoraŭ aldonis: „Sed ĝi restu severe nur inter ni!“

Post momento la bejo efektive invitis la gastojn por malgranda distro. Li montris al angulo de la verando, kie flankeniĝis tapiŝa kurteno kaj vidiĝis ŝtupoj malsupren en ĉambron lumigatan per diskreta ruĝeta lumo.

Ili trairis ankoraŭ unu kurtenon kaj troviĝis en sinjorina buduaro. Tapiŝo apud tapiŝo, remburitaj seĝetoj, ĉe la muroj tabletoj por nigra kafo, en la angulo fortepiano. En alia angulo granda orumita kaĝo kun multekoloraj kolibroj. De la fortepiano sin levis sinjorino vualita ĝis la okuloj kaj ĝoje elkriis renkonte al la venantoj.

Abd-el-Bahar prezentis al ŝi Ŝtefanik-on, dum la kolonelo, kiel oni povis vidi, estis ĉi tie gasto bone konata.

Du nigraj malgajaj okuloj fiksiĝis je li kaj mola mano forte ekpremis la lian. Kion postulas de li ĉi tiu virino? Ho kiaj okuloj! Pro Dio, kie li jam vidis ilin? Tio estas ja la okuloj... jes la okuloj de la Sartino el la haremo de la taŝkenta aksazalo. Sed estu kiel ajn, nur singardo, li diris al si mem, ekmemorante la malgajan sorton de sia akompaninto, kiu perdiĝis en Alĝerio. Dum 1-a konversacio, kiu sekvis, efektive evidentiĝis la franca deveno de la edzino de l' bejo. Ŝia elparolo estis pure franca. Kaj tian manieron, per kiu ŝi tuŝis la klavojn de la fortepiano, povis havi nur eŭropanino. Malgraŭ la kriado, kiun komencis la kolibroj tuj post la unuaj agordoj, la muziko emociis ĉiujn aŭskultantojn, precipe Abd-el-Bahar, kiu sidis kun krucitaj kruroj plej proksime al la fortepiano, subis per sia buŝo la cigaredon kaj per la okuloj sian edzinon.

Post la dua muzikpeco, ia gnoma svarmado de Grieg, leviĝis la kurteno kaj servisto transdonis leteron. Abd-el-Bahar ĝin malfermis, legis fluge kaj montrante nenian impreson, faris signon al siaj du altranguloj. Post momento li ekridetis, dirante al Ŝtefanik kaj la kolonelo:

„Sinjoroj pardonos por momento. Ni devas urĝe interkonsiliĝi.“

Apenaŭ la kurteno post ili refermiĝis, la edzino de la bejo ekpaŝis al Ŝtefanik, fortiris la broditan vualon kaj staris vid-al-vide kontraŭ li. Malgraŭ la orientana frapanta kolorigo vidiĝis bela vizaĝo, en kiu pleje efikis la okuloj. Grandaj, melankoliaj okuloj!

Ŝi kunmetis la manojn kaj ekpetis:

„Sinjoro! Ni disponas nur pri kelkaj momentoj. La kolonelo rakontis al mi pri viaj vojaĝoj, pri viaj servoj al Francujo. Mi scias, ke vi estas

gentilhomo. Kompatinda, humiligita francino petegas vin: Savu ŝin! Ok jarojn mi sufokiĝas en sklaveco. Mi pereas sopirante je mia Francujo. Liberigu min kaj ankaŭ mian filinon. Mi petas vin – ne diru, ke ne...“

„*Madame*,“ estris la unuan surprizon Ŝtefanik, „mi dankas vin por la fido. Sed krom la gastemeco ankaŭ mia oficiala sendo detenas min, ke mi helpu vin persone. Sed...“

„Sed?“ ekbrilis ŝiaj okuloj esprimantaj plenan esperon je lia respondo.

„Lasu min, *Madame*, mi petas, pripensi almenaŭ unu tagon!“

„Bone, morgaŭ, pretekstante, ke ni venas adiaŭi, ni vizitas *Madame*,“ interrompis la interparolon la kolonelo, iom malkvieta jam, ĉar Abd-el-Bahar povis ĉiumomente reveni.

„Jes, morgaŭ ĉi tie je la tria.“

Aŭdiĝis paŝoj de revenantoj. La edzino de la bejo envualigis sian vizaĝon, eksidis ĉe la fortepiano kaj mallaŭte tuŝadis la klavaron.

La sekvintan tagon, je destinita horo, atingis la kolonelo kun Ŝtefanik feliĉe ŝian buduaron. Ŝtefanik alportis ankaŭ fotoaparaton. Enirinte la ĉambron, li poziciis ĝin sur la fenestron kaj eksponinte, li havigis al si la fotografajon de la enireja parto de la korto.

„*Madame*, do mi ne diras ne. Sed mi mem, ekskuzu min, ne povas plenumi la deziron esprimitan. Tamen, mi havas sekretarion, kiu restis en Alĝero. Se ni kunvenos ankoraŭ, kaj mi firme kredas tion, ni ambaŭ revenos al Laghouat, eble jam post duonjaro, kaj tiam ni pritraktos la aferon. Mia sekretario ne riskos tiom kaj havas krom tio la avantaĝon, ke li perfekte parolas arabe. Tial atendu kaj kredu! Sed antaŭ ol mi foriros – ĉu mi povus peti de vi fotoportreton?“

„Fotografajon? Neeble!“ ŝi teruriĝis. „Malpermesite!“

„Ĝi estus legitimilo por mia sekretario, se li venus sola. Kaj por mi – rememoraĵo.“

Ŝi ekŝanceliĝis. Subite ŝi turniĝis al la kolonelo kaj mansignis al la elirejo. La kolonelo malaperis malantaŭ la kurteno.

Nun ŝi deŝiris la diverskolore broditan kaptukon kaj ankaŭ la vestaĵon ĝis la zono. Sur la brusto ekbrilis la arĝentaj apogiloj kaj ŝi enpaŝis la sunradiojn penetrantajn tra la kradoj de la fenestro. En tiu momento ŝi estis kvazaŭ enkorpiĝinta delogo.

Ŝtefanik malfermis la objektivon, kunmetis la aparaton, kaŝis ĝin sub la mantelon. La edzino de la bejo surmetis la robon, la vualon – dum la kurteno ekbrueto kaj eniris la kolonelo mansigne avizanta, ke proksimiĝas Abd-el-Bahar.

El la romano „M. R. Ŝtefanik“, 1934. / Tradukis V. Jukl

La Infano Jesuo de Prago L'enfant Jésus de Prague

Paul Claudel

Neĝas.

La granda mondo estas sendube morta. Estas decembro.

Sed, ho Dio mia, kiom bone estas en la ĉambreto!

La kameno plena de ardantaj karboj
koloras la plafonon per dormema reflektio
kaj oni aŭdas nur la akvon, kiu bolas kviete.

Tie supre, sur la breto, super tiuj du litoj,
sub la vitra globo, kun krono sur la kapo,
unu mano tenanta la mondon, la alia preta
por kovri tiujn etulojn, kiuj konfidis al Li,
tiom aminda en sia granda solena robo
kaj impona sub tiu grandega flava ĉapelo,
la Infano Jesuo de Prago regas kaj tronas.

Li estas tute sola antaŭ la fajrujo, kiu Lin lumigas
kiel la hostio kaŝita en la profundo de la sanktejo.

La Infano-Dio ĝis la tagiĝo gardas siajn fratetojn.



Il neige.

Le grand monde est mort sans doute. C'est décembre.

Mais qu'il fait bon, mon Dieu, dans la petite chambre!

La cheminée emplie de charbons rougeoyants

Colore le plafond d'un reflet somnolent,

Et l'on n'entend que l'eau qui bout à petit bruit.

Là-haut sur l'étagère, au-dessus des deux lits,

Sous son globe de verre, couronne en tête,

L'une des mains tenant le monde, l'autre prête

À couvrir ces petits qui se confient à elle,

Tout aimable dans sa grande robe solennelle

Et magnifique sous cet énorme chapeau jaune,

L'Enfant Jésus de Prague règne et trône.

Il est tout seul devant le foyer qui l'éclaire

Comme l'hostie cachée au fond du sanctuaire,

L'Enfant-Dieu jusqu'au jour garde ses petits frères.

Neaŭdeble kiel la elspiro
la eterna ekzisto plenigas la ĉambron
por ĉiuj ĉi simplaj aĵoj senkulpaj kaj naivaj!
Kiam Li estas kun ni, nenio malbona okazas al ni.
Oni povas dormi, Jesuo, nia frato, estas ĉi tie.
Li estas nia kaj ĉiuj ĉi bonaĵoj ankaŭ:
la mirinda pupo, la ligna ĉevalo
kaj la ŝafo estas tie, en tiu angulo, ili tri ĉiuj.
Kaj ni dormas, sed ĉiuj ĉi bonaĵoj estas niaj!
La kurtenoj estas tiritaj... Tie, ie malproksime
en la neĝa nokto la sonoriloj frapas ian horon.
La infano en sia varma lito komprenas kun ĝojo,
ke ĝi dormas kaj ke iu, kiu ĝin amas, estas tie.
Movetiĝas iom, mallaŭte murmuras, elmetas la brakon,
provas vekiĝi kaj ne povas.

Inentendue comme le souffle qui s'exhale,
L'existence éternelle emplit la chambre, égale
À toutes ces pauvres choses innocentes et naïves!
Quand il est avec nous, nul mal ne nous arrive.
On peut dormir, Jésus, notre frère, est ici.
Il est à nous, et toutes ces bonnes choses aussi:
La poupée merveilleuse, et le cheval de bois,
Et le mouton sont là, dans ce coin tous les trois.
Et nous dormons, mais toutes ces bonnes choses sont à nous!
Les rideaux sont tirés... Là-bas, on ne sait où,
Dans la neige et la nuit sonne une espèce d'heure.
L'enfant dans son lit chaud comprend avec bonheur
Qu'il dort et que quelqu'un qui l'aime bien est là,
S'agite un peu, murmure vaguement, sort le bras,
Essaye de se réveiller et ne peut pas.

Tradukis Tomáš Břicháček

Amsezonoj

Eli Urbanová

Printempa amo – flirta sent’,
kaprica kiel maja vent’,
lepora salt’ en malkviet’,
burgona kant’ de la poet’.

Pasiaj amoj de l’ somer’ –
ĉieltoastoj kun infer’,
sangruĝaj rozoj en buked’
ŝiritaj sur edena bed’.

Malfrua amo de aŭtun’ –
post nuboj palas laca sun’,
la tulpoj sinke klinas sin,
vualas koron svenpatin’.

La vintra am’ – velkinta flor’
jam senkolora, sen odor’,
ĝin kovras ŝirme neĝa fel’,
tapiŝo blanka al ĉiel’.

1951

Luna nokto

Eli Urbanová

Arĝenta Lun’, ĉiela suvereno,
de stel’ al stel’ flirtanta kavalir’,
vidante vin naĝanta tra l’ kurteno
etendas mi la manojn pro admir’.

Promeni nun sur mola herbopluŝo
en bosk’ betula plena je parfum’,
sen vestkiras’ ekdanci sub rosduŝo
kovrite nur per via brila lum’!

Kaŝludos mi kun vi, arĝenta Luno,
dum virtuoze trilos najtingal’,
vi serĉos, serĉos – fine en laguno
atingos min la svene vibra pal’.

1952

Termíny schůzek od ledna:

16. 1. / 30. 1. // 13. 2. / 27. 2. // 13. 3. / 27. 3. // 10. 4. / 24. 4. // 22. 5. //
5. 6. / 19. 6.

Klub esperantistů v Praze,

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00
Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>
E-mail: paha@esperanto.cz
Facebook: <https://www.facebook.com/esperantoprago>
YouTube: Esperanto Prago
Schůzky: Revoluční 5, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00